Ludwig Heinrich Christoph Hölty,

# Printempa lido

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ĉielo bluas super mi;
En tiu verda valo ĉi
Floretoj buntas ĉie,
Sur la herbej'
En ĉiu ej',
Floradas idilie.

Pro tio venu tien ĉi,
Kaj ĝoju pri la mondo vi
Kaj pri l' bonec' de Dio,
Per kies fort'[2]
Kaj kies vort'
Fariĝis ja ĉi ĉio.

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingslied" de* Ludwig Heinrich Christoph Hölty *(Holtjo, Ludoviko Henriko Kristofo, ∗1748-12-21 – †1776-09.01) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1984-02-28.*

*MR-72-1 / Arg-508-997 (2014-05-01 09:00:10)*

Ludwig Heinrich Christoph Hölty,

# Printempa lido

*tradukita de Richard Schulz*

Aero blua, verda val'!
Invitas nin herbej-regal'.
Floretoj Majaj floras.
Primola bunt'
Natura punt'
La grundon pli dekoras.

Nun venu la amant' de l' Maj',
Ekĝoju pri la mondo kaj
La Dia patra amo;
Estigis ĝi
Kun harmoni'
La arbon en ornamo.

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingslied" de* Ludwig Heinrich Christoph Hölty *(Holtjo, Ludoviko Henriko Kristofo, ∗1748-12-21 – †1776-09.01) en Esperanton de* Richard Schulz *(Rikardo Ŝulco, ∗1906-07-12 – †1997-09-26) en 1984-07.*

*Arg-508-998 (2013-02-26 15:15:37)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi tradukon en la "Vestfaliaj Flugfolioj", n-ro 61, kiujn eldonis siatempe s-ro Richard Schulz (Rikardo Ŝulco). Pri Richard Schulz troviĝas informoj en* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz`*. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz`*.*

[2] aŭ:
Kaj pri l' boneco Dia.
Per Lia fort'
Kaj Lia vort'
Ekestis belo ĉia.